"Jes, mi povas konsenti al tio" diris Alicio.

"Nu do" la Kato daŭrigis "la hundoj graŭlas kiam ili estas kolerigitaj, kaj svingas la voston, kiam ĝojigitaj. Mi, kontraste, graŭlas ĝojigite kaj kolerante svingas la voston. Ĉu do mi ne estas freneza?"

"Al tio mi ne konsentas" Alicio tuj respondis "ĉar ne per graŭlo la katoj esprimas plezuron; laŭ mi, ilia maniero esprimi plezuron estas tre dolĉa *murmuro*."

"Vi ĝin nomu laŭ via prefero" diris la Kato. "Ĉu hodiaŭ vi kroketludos ĉe la Damo?"

"Tion mi tre ŝatus" Alicio respondis avide "sed ĝis nun mi ne ricevis inviton."

"Vi tie vidos min" diris la Kato kaj—malaperis!

Tio ne multe surprizis Alicion; ŝi ja jam alkutimiĝis al strangaj okazoj. Dum ŝi rigardas la lokon, kie antaŭe sidis la Kato, ĝi subite reaperis. "Pardonu" ĝi diris "kio okazis je la bebo? Preskaŭ mi forgesis demandi!"

"Fariĝis porketo" Alicio respondis tre trankvile, kvazaŭ la Kato revenis laŭ la ordinara venmaniero.

"Mi kredis ke tio okazos" diris la Kato kaj denove malaperis.

Iom da tempo Alicio staris atende, kredante ke ŝi eble revidos ĝin. Poste ŝi komencis iri



en la direkto de la loko kie, laŭ la Kato, loĝas la Martleporo. "Ĉapelistojn" ŝi diris al si "mi jam konas; do la Martleporo estos por mi multe pli interesa: kaj ĉar ni jam havas Majon, ĝi eble ne estos furioza; aŭ almenaŭ malpli furioza ol en Marto."

Dirante tion, ŝi suprenrigardis. Jen denove la Kato sidis sur arbo-branĉo.

"Ĉu vi diris porkon, aŭ forkon?" diris la Kato.

"Porkon" respondis Alicio "kaj mi multe preferus, se ĉe sekvantaj alvenoj vi bonvolus aperi kaj malaperi malpli subite: tiu subiteco via estas por mi vere kapturniga."

"Laŭ via plaĉo" diris la Kato, kaj tuj ekmalaperis tutmalrapide, komencante per la vostpinto kaj finante per la grimaco, kiu restis kelkajn momentojn post kiam la cetera korpo malaperis.

"Nu" pensis Alicio "tre ofte mi vidis katon sen grimaco; sed *grimaco sen kato*! jen la plej kurioza objekto kiun mi iam vidis en la tuta vivo."

Irinte antaŭen kelkajn paŝojn plu, ŝi ekvidis la domon de la Martleporo. Ŝi kredis ke tio ĉi certe estas *lia* domo, ĉar la du kamentuboj havis la suprojn en formo de longaj oreloj, kaj la tegmento estis kovrita per felo. La domo estis multe pli granda ol la dukina; sekve ŝi